


Abel Montagut (1953 —) :

Poemo de Utnoa

Pro Esperanto (Vieno, 1993)



Unua kanto

Naŭton mi himnos kaj universe faman arkeon
kiuj elsavis vivon el tutplaneda diluvo.
Multon li trasuferis dum ĉarpentado de ŝipo,
hezitojn kaj ĉagrenojn daŭrajn fortbruste li venkis,
ĝis ondoj urbojn kovris kaj tutan teron inunde.
Homoj kaj bestoj en ŝlimfundo fordrone pereis.

Ĉiela Muzo, rakontu nun pri l'veraj eventoj
kiam elŝvelis maroj kaj la kaoso tumultis.
Ĉu ĝi fatalis nepra aŭ oni povis eviti?
10 Ĉu kataklismon mondan diaĵo pune provokus
pro flama vengdeziro kontraŭ milkrima genero?
El altoj alparolu, ĉion klarigu volonte.

Kiam tendumis Uttu kun sia tribo nomada
en la Ŝinara lando, ĉe la Puratta rivero,
li suprengrimpis monton dum la matena krepusko.
Tie li tute solis rememorante la faktojn
praajn de sia gento, kiam subite li aŭdis,
ke jen el nordo blovas obtuza vento susura
kaj li ekvidis brilan stelon el tiu direkto,

20 pli brilan ol Iŝtaro, kiu ĉiele majestas.
Sed jen ĝi ekmoviĝas kaj fulmovoje rapidas
tra l'firmamento blua. Super Utnoa zenite
ĝi nun similis nubon kun mil nuancoj irizaj.
La nubo malleviĝis kaj ŝvebis super la arboj.
Per pluvo de fajreroj, ĝi kovris ronde la zonon.

30 Preter l'unua miro, li nun observi kapablis,
ke ĝi aspektas kvazaŭ kupola domo fluganta,
kun muroj el arĝento aŭ lazurstono polura.
Ĝi surteriĝis antaŭ li: laŭ hufaro de bovo
impresis ĝiaj plandoj, kiuj en grundon eniĝis.
Ĉe ties ambaŭ flankoj fenestroj rondaj abundis
similaj je okuloj alrigardantaj enigme.
Li tiam vidis buntan brilon ekstere kaj ene
kiel la ĉielarko post la pluvema vetero.
Jen pordo nun ekbuŝis sur ties mezo brilanta,
ŝajne fandigis muro kaj aperturo magie
formiĝis. Ŝtupareto luma elglite subiris
ĝishume, dum ĉe l'pordo sin montris iu figuro,
kies aspekto estis kiel la bildo de homo.
40 La lumo lin blindumis, mistera vento zefiris
blovate de l'rondulo; pro trankviligaj efluoj
surgrundon Uttu svenis kvazaŭ li falus abismen
kaj perdis la konscion antaŭ la bildo venanta.
Samkiel blanka urso por letargio kuŝiĝas
profunde en kaverno aŭ en fendaĵo de roko,
post kiam dum aŭtuno ĝi grasnutriĝis abunde,
por povi pretervivi sub la frostego polusa;
aŭ kiel jakareo dum la Afrika kacimbo
sub koton enteriĝas, monatojn ŝirme tradormi
50 en viskoglua ŝlimo de sekiĝinta rivero
aŭ de multherba lago, por ne enrampi la silvojn,
simile Uttu svenis sur la herbaro de Bezer,
vidinte fajroĉaron alproksimiĝi tra nuboj.

Tiam li aŭdis voĉon, kiu en cerbo resonis:
- Ekstaru, ho Utnoa, ĉar mi parolos anonce.

Li estis Emme, ano de la popolo de Goba,
kiu tra spaco venis el sunsistemo Iboo.
Kiam eksplodis konstelacia supernovao
Nugu, ilia praa astro detruie glutiĝis

60 flame. Antaŭvidite de sciencistoj iliaj,
konscie, ke nenio kroma evite fareblas,
Gobanoj ekkonstruis gigantajn spackoloniojn
ĉirkaŭ la hejmplanedo kaj tiujn oni provizis
per ĉiaj materioj, rimedoj kaj per selektaj
faŭno kaj flaŭro propraj. La kolonioj egala
estis cilindroformaj, je kvardek tri kilometroj
longaj, kun radiuso je kvarmil metroj. Ilia
ŝelo konsistis nur el dura, travida metalo
70 *izuo*. Kaj ekstere, je ĉirkaŭ du kilometroj,
speguloj orienteblaj, larĝaj, konkave triopis,
kiuj reflektis enen la stelan lumon Iboan
prilumi la internan geografion unikan.

Ĝi reproduktis tiun Goban kaj eĉ rivereton
inĝenieroj faris, laŭlonge, kies imunaj
akvoj enfluis en basenon ĉe unu el ties
finoj kaj per subteraj duktoj ĝi ree fluadis
al ĝia origino. Oni konstruis aparte
loĝejojn ekipitajn laŭ la kutimo de Goba.
Ĉe ambaŭ ekstremajoj de l'kolonioj *izuaj*
80 situis hidrogenaj akumuliloj aneksaj,
kapablaj provizadi per energio la spacan
planedoidon longajn jarojn, se diste de fonto
stela. La cilindregoj laŭ plej preciza rapido
rotaciis, por kreo de gravitado konforma
al enloĝantoj, kiuj je sia flanko nenian
movon perceptis.

Kiam la decidita momento
venis kaj proksimiĝis la katastrofo fatala,
la kolonioj Gobaj forflugis migri duope
en la senliman kosmon, laŭ vojdirektoj aliaj,
90 serĉi planedon, kie ili pluvivi kapablu.

Unu el tiuj estis la kolonio nomata
Naje, kiu la teron antaŭ sep jaroj atingis.
Depost la fordetruiĝo de l'origina planedo,
gobdoj longtempe migris laŭ vastaj vojoj eteraj
en sia kolonio. Sed la ekzila popolo
nenie trovis hejmon en ripozloko havena.
Kiam post naŭ generacioj planedo vidiĝis,
bilde pligrandigita sur la staciaj ekranoj,
versajne vivotaŭga laŭ Komputilo Ŝamoa,

- 100 ĉiuj admire gapis kun rave miraj okuloj:
al la respirata Goba ĝi ege similis.
Unue ili sondis pri l'atmosfera medio
kaj prikonstatis baldaŭ, ke ĝi spireblas akorde
al l' organismo propra. Sed tiam sur la planedo
malkovris civilizojn kaj konsekvence ne rajtis
damaĝi l'aŭtoktonojn, ĉar laŭ steljuro ne licas
sisteme kolonii se civilizo surloĝas,
krom se samspeca, pro l'perturbo radike detrua.
Ili ĉirkaŭorbitis explore studi la astron
- 110 kaj ties kulturformojn. Tiam vekigis absorbaj
diskutoj nefineblaj, ĉu la teranoj esence
estas raciaj aŭ nur subraciuloj *agaoj*.
Sed je la sepa jaro okazis fakto decida
kaj Asembleo de Najrepresentantoj ariĝis
sur centra monto, apud la ĝardenurbo Oara,
sub kupolego vitra de la Ajuba leĝejo,
dronanta en arbaroj de korfoliaj *obuoj*.
Ĉiuj leĝodonantoj ĉirkaŭ Ajuba rezidis,
kun sia familio en flava domo tubronda.
- 120 Kaj ili jam envenis. La halo sparke briladis
per vestoj multkoloraj de la Najanoj elektaj.
- La estroj de l'popolo atentoplene silentis
tuj kiam prezentiĝis grizhara Oes Ogia
el flanka pordo ronda al longetabla tribunio.
Li estis superulo inter reganta kvaropo,
kun karaktero milda, fama pro siaj afablaj
gestoj. Matenon ĵusan, dum aŭdienca deforo
en sia *dojemuo* -ĝardeno ĉirkaŭloĝeja-,
dum li konversaciis kun teknikisto promene,
- 130 li sciis, ke filino je kelkaj metroj atendas
kun nepoj kaj bofilo, kiujn de pluraj monatoj
li jam ne vidis. Vicis antaŭe juna geparo.
Kuris murmuro, ke tiuj estas kare parencaj
kaj ambaŭ sin adresis al li per simpla propono,
ke tiuj antaŭiru, ĉar ilin urĝo ne premas.
Okulojn de Ogia larmoj videble vualis
kaj, fruntokline, li tuŝis ambaŭpolme genuojn
de allasintoj, en eksternorma signo de danko,
ĉar tiun faris iam nur servutuloj omaĝe.
- 140 Similajn ĝentilaĵojn Ogia ofte prizorgis
kaj estis plej amata de la Najana civito.

Nun lia voĉo sonis en l'Asembleo ĉiela:
- Gobanoj, kiom longe ni jam vojaĝis elmigre
tra vojoj ĉiamnoktaj de l'universo vakua,
de kiam nian astron la Granda Krabo devore
glutis for. Efiedi, nia kosmurbo ĝemela
perdiĝis antaŭlonge en blinda ŝtormo de sablo
kaj restas nun malmulte da energio provize
en nia kolonio. Ne eblas rajte popoli
150 ĉi tiun astron bluan, ĉar interstela leĝaro
malhelpas kolonii se civilizo surestas,
krom se samranga. Venis, tial, la tempo decidi,
ĉu kosme ni daŭrigu nian vojaĝon amaran,
aŭ ni orbitu plue ĉirkaŭ la astro lazura.
Roa Numuo pretas informon doni ĉi-teme.

- Tiam ekstaris Roa, nepo de l'fama Numuo,
kiu la lasta iam en Efiedi prefektis.
Li estis krispehara kun brunhardita vizaĝo,
mallarĝa, rekta nazo kaj gagatnigraj okuloj.
- 160 Kelkaj Efiedanoj sukcesis savi la vivon
je l'rompo de l'stacio kaj translokiĝi ĉe Najon.
La idoj de Numuo de tiam ĝuis enurbe
altajn postenojn, memore de la tristaj okazoj,
kaj de l'deveno grava. Li tiutempe komandis
la skoltajn ŝipeskadrojn de l'kolonio de Goba
kaj en la propra ŝipo plej avangardan ekipon
el mezurinstrumentoj havis. Kun brusto brulanta,
ekstaris asemblee kaj laŭtavoĉe li diris:
- Ĉefoj el Goba, nia popolo longe vojaĝis
170 kun la misio trovi por nia gento la novan
astron loĝeblan. Antaŭ la kataklismo veturis
multaj koloniparoj en ĉiuj kosmodirektoj
cele al tiuj steloj kun rimarkinda probablo
de astro vivkondiĉa, por ke ĉiamu tratempe
nia genera raso kaj civilizo supera,
kiu sendube rangas ĉe la plej altevoluaj
en l'universo. Ĝuste nun ĉe la celo ni sidas,
jen antaŭ ni tuŝeblas la priserĉata planedo,
kiu el drono savos nian popolon jam lacan.
- 180 Kial ni plue fuĝu en la vakuon eterne?
Ĉar jen nin klare helpas la pradestino fatala.
Mi devas komuniki al l'Asembleo novaĵon
gravan: ni ĵus detektis per niaj iloj avertaj,

190 ke direktiĝas teren asteroido giganta
kun maso kaj rapido, kiuj influos esence
ĉe ties stabileco. Laŭ la inklino teraksa
kaj blokaj amasiĝoj de la glacio polusa,
precize kalkuleblas, ke la gravito renversos
la globon transbalance, dum ties paŝo apuda.
La kontinentoj turniĝos tuj laŭ nova direkto,
sed l'oceanaj akvoj, pro l'inercio, plu giroj
laŭ la antaŭa: ondegoj superrule balaos
la tutan globon bluan dum pluraj terrotacioj
kaj pasos longaj tagoj ĝis ĉiu grundo resekos
kaj maroj kvietiĝos en sia propra kuŝujo.
Ni povas antaŭvidi, ke l'rendevuo citita
okazos post du teraj jaroj, je l'sepa monato.
Konklude: ĉiuj teroj suferos vastan inundon
neelteneblan, tiel ke l'vivantaro sur ili
200 nepre pereos drone, kio plenrajte permesos
la teron kolonii far la popolo de Goba.

210 Granda ekscito skuis la Asembleon Oaran.
Kelkajn surprizis tio, ke la informo sekretis,
aliaj skeptikumis, ĉu ĝi realas iele.
- Se Numu pravas -ekstare intervenis Udue,
la ĉefingeniero de l'kolonio Najana-,
ni plue orbitadu dum ĉi monatoj atende
kaj vidu, poste, kio iĝos pri l'tera planedo,
ĉar nia kolonio povas dumtempe rezisti
antaŭ ol celi sunon kaj el korono reŝarĝi
la energiprovizojn por vojaĝado venonta.
- Tamen, ĉu la teranoj iele estas *emioj*?
-dube demandis kelkaj, interpelacis aliaj.

220 Baldaŭ ekstaris Emme kaj en la halo li diris:
- Homoj el Goba, se la sciigo tute fidindas,
kaj Numu estas role la respondeca pri tio,
ni ne forgesu nian devon: laŭ juro ĉiela,
ni helpu la teranojn kaj ties morton evitu,
ĉar temas pri raciaj uloj. Ni trovu rimedon
deturni la trajekton de astro damne ruina.

Numuo agitiĝis en korpoforma sidilo,
kliniĝis sur la tablon kaj alresponde replikis:
- Gobanoj, la informoj certas. Ni jam reviziis

ĉiun detalon, ĉion ni prikalkulis atome.
Sed ni ne rajtas trudi ŝanĝon ĉe l'kurso de l'astro.
Se tiun ni deturnus, ĉu ĝi ne povus alie
provoki kataklismon en nekonata planedo?
Ne licas interveni en galaksiaj aferoj.

230 Jene respondis Emme kun brovodensa rigardo:
- Roa Numuo, ĉiuj scias en Naj evidente,
ke licas interveni por la defendo de raso
racia. Ĉu Gobanoj ne faris tute laŭ eblo
eviti la diskrevon de nia hejmo iama
kaj poste dum forbrulo de la stacio ĝemela?
Ni uzu l'energion de la kosmurbo deturne,
ĉar ĉiuj raciuloj estas samrasaj esence.

240 Tiam indignis Roa kaj respondante li diris:
- Emme, vi ja klopodas blinde, ke nia popolo
pereu. Ĉu ni estas iel samrasaj al uloj
sovaĝaj kaj etcerbaj? Kiu kuraĝus aserti
tion, Gobanoj, post la esploroj ĵuse faritaj
sur la planedo blua? Ĉu vi forgesis entute
pri l'krimoj registritaj sur Kontinento de Flamoj?

250 Ogia nun ekstaris dum asemblea silento:
- Gobanoj, la informon, pri kiu Numu raportis,
mi mem superkontrolis rekte, helpate de pluraj
ekspertaj sciencistoj: ĝi estas plene kredebla.
Ni rememoru tion, ke l'kolonio de Goba
nun statas difektita kaj malfacile ĝi tenos
longan veturon tra la spaco al suno hazarde
havanta loĝplanedon. Tial pluvivo de nia
gento dependas de la koloniado de tero.
Ni povus realigi ĝin se l'Bluulo suferus
tiun inundon vastan kaj la homaro fordronus.
Sed staras nun dilemo, ĉu senelturne ni devas
protekti la teranojn aŭ ni allasu detruon,
por kio nepras scii, ĉu ili estas *emioj*
envere. Kaj ĉar unu konsiliano defendis
ilian *emiecon* en l'Asembleo, laŭmore
260 devas konstituiĝi la Tribunalo Supera,
kies neapelebla verdikto fine decidus.
Ambaŭ kontraŭstarantoj prezentu tie la pruvojn.

270 Inter la Gobaj vicoj ŝvebis murmuroj aprobaj
kaj per laŭjuraj vortoj la asembleo fermiĝis.
Ili elvenis tuj el Leĝejo kun opinioj
kontrastaj kaj diversaj laŭ pluraj grupoj ariĝaj.
Kiel disflugas kampe dum la aŭroro matena
abeloj multesvarmaj super lekantoj odoraj
kaj tra l'aero zumas, dum bruna urso kaŝiĝas
embuske post abio, preta disrabi la ĉelojn,
tiel babilis ĉiuj pri la novaĵoj Ajubaj
kaj inter altaj arboj al sia hejmo veturis.

280 La koloniaj domoj, nomataj Gobe *ŝabioj*,
similis talofitojn, kiuj surtere nomiĝas
fungoj. El grundo ili laŭvole povis emergi
el ŝaktoforma kavo, puŝate preme de longa
piŝto, kiun injekto movis vaporo sodia,
havata perrimede de reakcio nuklea.
La vera hejmluĝejo en supra volbo situis,
kuŝanta jen terrande, jen leviĝanta plurmetre,
precipe dum sunsinko. Eblis ĝin turni surakse
por lanta kontemplado de l'horizonta linio,
per kio la Gobanoj antaŭ ekdormi plezuris.
Kiel al terloĝanto aspektus bordo rifeca,
abunda je lumturoj kun intermita rebrilo,
en stelgraveda nokto, tiel dumtempe similis
la ebenaĵoj Najaj post la vespera krepusko.
Ankaŭ Numuo venis al sia hejmo *ŝabia*,
staranta meze de *aŭks*-arbusta valo Natoŭse,
290 kaj li mallevis ĝin en la nigra nokto de Naje.

300 La sepan tagon, laŭ la leĝoj de l'mondo ĉiela,
kunvenis, en Oara, Kortumo Supra de Gobaj
reprezentantoj, kiuj flanke, tribune sidiĝis.
Post la formuloj juraj, kiujn Ogia prononcis,
li tuj invitis Roan por la sesia komenco,
kiu ekdiris antaŭ la Tribunalo ĉi-vorte:
- Juĝontoj, mi alportos pruvojn decide refuti
la veran emiecon de la teranoj, apoge
pri la nedevo ŝirmi ilin el plena detruo.
Unue mi prezentos holoinformon atestan
pri festo kiun Utloj nomas de Koat la Granda,

freŝdate okazinta sur Kontinento de Flamoj.
Niaj magnetoskopo registris stude la faktojn
nur antaŭ du monatoj el la alteco kutima
de naŭcent tridek metroj.

310 Meze de l'halo Ajuba,
sur kondiĉita ejo, en travidebla kasono,
aperis buntaj bildoj kaj reliefo viviĝis.
Kiu neniam spektis tiajn, ekkredus alarme
ĉion reala kaj timus pro la fluo de sango
kaj orelŝiraj ŝrikoj. Sed la Najanoj atente,
senmove alrigardis.

320 Jen indiĝenoj aklamaj,
lukse vestitaj, laŭ stratoj de l'ĉefurbo Tahuo,
kunvenas en la placo de l'Granda Templo, soleni
la tagon plej elstaran, al sia dio honore.
La manoj kunligiĝas. Ekflirtas danco Vipura.
Sonoraj kantoj laŭtas kiel murmuro de ondoj.
Kaj tiam Bunoganoj decidas murdi la Utlojn.
Ili ensvarmas placen kun vundopretaj armiloj.
Kuras elirojn ŝtopi, pasejojn kaj koridorojn:
la pordon de la Aglo, ĉe la Malgranda Palaco,
tiun Kanpintan, tiun de l'Milspegula Serpento.
Post la sieĝo placa, ili perarme deĵoris
strikte kaj iu Utlo ne povis save foriri.
Soldatoj nun enkuras por murdekstermi la homojn,
portante lignajn ŝildojn, dum kelkaj bronze metalajn.
Glavojn aere svingas, piklancojn sange soifajn.
Ili alproksimiĝas, ĉirkaŭas jam la dancantojn,
vundas la tamburiston, forhakas ronde jen ambaŭ
brakojn. Kaj per glavbato lin senkapigas akrege;
330 la kapo disten falas, rule en flako de sango.
Senpaŭze ili lancas, boras ponarde la karnon,
ĉiujn dishakas, kelkajn truas perglave dedorse.
Baldaŭ iliaj tripoj disŝute falas arenen.
Plurajn je torso trunkas: sekcas pantranĉe la kolon,
ties cerbujo restas oste splitita. Al iuj
la ŝultrojn breĉas kaj membrojn dispecige frakasas.
Unujn ili pikvundas sur belmuskola femuro,
tiujn ĉe l'tibikarno, aliajn meze de ventro.
La sango ŝprucas grundon dum kelkaj vane plu kuras,
340 siajn intestojn trenas kaj implikiĝas en ili.
Sopire je saviĝo, ne scias plu kiucele

forgambi. Tiam Bunoganoj pertorĉe bruligas sanktejon: ruĝaj langoj flagras en nigra nubego. Kiam la Utloj vidas ardi la Templon adoran, ili interparolas singulte, meze de ploroj. Ĉie leviĝas plendoj kaj ŝiraj ĝemoj amaraj.

La holodramo haltis. La bildoj svene viŝiĝis. Numuo turnis sin al l'elektitaro de Goba:

350 - Najanoj, ni ĵus vidis konduton vere kruelan de la Bunoga gento kontraŭ festanta popolo. Tamen, la Utloj estas neniel malpli sovaĝaj ol propraj malamikoj: tiu amasa buĉado ŝuldiĝis, kiel poste per esplorado ni povis dokumenti, al fakto, ke la popolo Tahua disprezis ĉe l'najbaraj triboj, perforte prirabis knabinojn, ĉiujare, por oferbuĉi vivantajn sur la altaroj templaj dum solenaĵo de Koat la Granda. Bunoganoj kun tiuj triboj iritaj sekrete akordiĝis kaj venkis ruze la urbon.

360 Similajn kruelaĵojn ni senescepte registris pri l'teraj aŭtoktonoj, ĉie tra l'blua planedo: ĉe l'Mirgoj, la Sakaroj, la Tuloj kaj la Baeoj, Agartoj kaj Doguŝoj, Tepeoj, Doja popolo... Ĉu iel forgesebblas la postmilita privenĝo fare de Dojoj kontraŭ la malamikoj agresaj? La generalo Hnoum restis sur loko batala ĝis la mateno sekva kaj je l'aŭrora krepusko portigis tiujn homojn, kiuj vundiĝis el inter ĵusaj militkaptitoj de la velŝipoj oponentaj

370 kaj kondukigis sur la strandon. Li baldaŭ ordonis kunligi ilin vice. Poste, per poŭpo galera, antaŭ spektantaj trupoj, igis enmare trenadi ĝis ĉiuj drone mortis. Tuj sekve al la ceteraj senvundaj prizonuloj elpikis ambaŭ okulojn, krom al unua, kiun blindigis nur je la dekstra, ke li konduku ĉiujn ŝnure al sia reĝino kiel donaco. Plie, kiu kapablus atesti pri la impreso de mil ŝrumpaj surmure pendantaj kapoj de l'buĉe oferitaj en templo de Tule,

380 kies pastrinoj havis harojn en sango banitajn, en ĉambroj kun kaheloj gluaj kaj naŭze haladzaj, plenplenaj de kadavraj membroj surgrunde kuŝantaj? Aŭ kion mi raportu pri la invado de Sohel

far la popolo Guna: ĉu pri l'perforto de inoj aŭ buĉo de infanoj en la vilaĝo Tepejlo? Senfine la informo daŭrus: nenie ni trovis escepton ĉi-rilate en iu tera popolo kaj la memoro fuĝas de revivigoj amaraj. Homoj el Goba, kiu trovas entute racion ĉe tiaj kruelaĵoj? Ĉu iel oni kredemus, se ni ne vidus ilin kaj titankube registrus? Ja temas nur pri monstroj, mutaciintoj eraraj, kruelaj jam denaske, estuloj murde refleksaj, do raso eksterminda ĉar iĝas kosme minaca. Laŭ freŝaj esplorserĉoj, kiujn Sooje pretigis, montriĝas, ke ilia violenteco medola havas biologian bazon: ĉar ili posedas hormonon unikspecan, mankantan en la Gobanoj, kies influoj korpaj ne kontroleblas efike

390 de l'cerbaj centroj, kio ilin verŝajne peladas al tiaj fuŝkonduitoj eksterracie ferocaj. Ni vidu holograme ĝian internan aranĝon, kiu rilatigeblas al misformiĝo genera.

Travidaj tuboformoj, pligrandigitaj, aperis sur la podio centra kaj serpentece sinuis. Numuo, porkompare, bildigis unu Gobanan, lasere atentigis pri ĉiu formo diverĝa, dum la spertulo Inna pri la signifo klarigis. Post la demonstracio, Roa daŭrige parolis:

410 - Vi vidis klarajn pruvojn, ho ĉielana popolo, pri la subhomaj ecoj de l'loĝantaro de tero kaj ankaŭ pri la kaŭzo de la konduto demenca. Ni rajtas juĝi ilin eraro de la naturo, ĉar sindetrua raso fariĝas kosmodetrua. Konklude, ili estas neniel veraj emioj sed nur mutaciuloj fuŝaj. Pro tio ne licas ŝanĝi la kurson de la asteroido minaca, ĉar nur se temus vere pri iu raso racia, ni povus interveni ĉe galaksiaj aferoj,

420 forturni ĝin. Sed temas nun pri l'kontraŭa kazuo: neinterveno helpas ĝuste la rason emian.

Ĉiuj silentis hale. Roa Numuo sidiĝis. Sekve Ogia, ĉefo de l'Tribunalo, parolis: - Nun la alia flanko povas alporti la pruvojn.

Baldaŭ ekstaris Emme, la olivhaŭta Soraa,
 en blua strikta vesto, manikoj flave koloraj,
 respondaj al metio en la subgrundaj areoj.
 Jene li ekparolis en l'assembleo juĝonta:
 - Gobanoj, ja ne eblas scii pri l'veraj efikoj
 430 de hormonspeco nova sen esplorado profunda
 kaj oni ne imputu al tiu kaŭzo la ecojn
 de la homara gento, ekster socia realo.
 Nur de kondutonormoj la emieco dependas
 kaj ne de genetikaj, kiuj miloble varias.
 Do, tiujn mi esploris kaj por pritakso prezentos.
 Juĝontoj, vi aŭskultis la konvinkeman aserton
 de Roa, ke la tera raso kruelas esence,
 ĉie sur la planedo, laŭ absoluta regulo.
 Tamen, escepto grava sur la Bluulo troveblas,
 440 kio radike povas aliecigi la juĝon.
 Mi ĵus esploris gentojn de l'regiono Ŝinara,
 kie ekzistas tribo, en kiu plene forestas
 tiaj kondutoj. Ĉar jam multis entute similaj
 diskutoj inter ni, mi decidis loĝi sekrete,
 kelktempe, kun teranoj por koni funde la trajtojn
 de tiu gento. Ili loĝis en Dilmun antaŭe,
 insulo situanta meze de l'maro de Ŝinar,
 insulo fruktodona, kie paŝtejoj abundis
 por la brutaroj hejmaj, kun freŝe milda klimato.
 450 Kiam la polnombro kreskis, oftigis agresaj
 kvereloj inter klanoj pri la posedoj aparte
 pli riĉaj. Ili fosis kavojn, laŭlonge palisojn
 levis ĉirkaŭ kamparoj propraj. Kaj fine bruliĝis
 bataloj ĝeneralaj sur la herbejoj edenaj.
 En Dilmun tiaj buĉoj certe neniam okazis
 pli frue. Oni rabis, la homojn murde masakris
 kun hejmaj bestoj. Iam sur la insulo troveblis
 nur morto kaj detruo. Leviĝis pesto ruina
 kaj la supervivintoj baldaŭ amase pereis
 460 meze de doloregoj: ilia haŭto nigriĝis,
 la lango ŝvelis tiom, ke ĝin la buŝo ne povis
 teni kaj malsanuloj mortis en pala sufoko
 ene de konvulsioj dramaj. Sed kiuj evitis
 la peston kaj postvivis, kunvenis grupe ĉe maro
 kaj ĵurligiĝis migri el la insulo patruja,
 promesis ekziliĝi per alta ĵuro solena
 dum sep generacioj kaj dume vivi nomade

sur fremdaj landoj kaj ne plu iun homon iele
 mortigi, ĉu sampopolanon aŭ ĉu malamikon,
 470 ĝis estos forviŝitaj el la memoro komuna
 ĉi tiuj teruraĵoj. Nur tiam ili revenos
 rajte al la insulo hejma. La tribo de Dilmun,
 antaŭ malmultaj jaroj, kampadis sudoriente
 de la Ŝinara lando. Sed la popolo denove
 devis formigri, tial ke startis grava milito
 inter tribaroj montaj kaj la ĉefurbo Nineve.
 Alianciĝis urboj kontraŭ popolo Kiduma
 kaj la nomadaj triboj kontraŭ la urbaj armeoj.
 La Dilmunidoj migris norden al tero pli paca,
 480 ne falis en sangbanon. De longe ili la ĵuron
 respektas plu senmanke. La historio konata
 de tiu gento pravas, ke violento ne estas
 esenca al teranoj pro genetika kialo,
 sed ĝi devenas nur de l'fakto, ke ili troviĝas
 ankoraŭ en stadio de evoluo komenca,
 samkiel ankaŭ nia pracivilizo trapasis
 parenkan origine, en fora tempo. Ĉu do vi
 forgesis pri l'transkriboj telepatie sendataj
 fare de *oaneoj*, kiuj neeviteble teroris
 490 en mensoj de l'prapatroj? Necesis nepre detekti
 ilin kaj tuj mortigi per mikrofaskoj atomaj,
 kio ebligis poste la evoluon unikan
 de nia civilizo. Procezon tute similan
 la loĝantaro de ĉi astro nuntempe trairas,
 ĉar tiu Dilmunida gento sendube superis
 etapon de murdemo kaj de sensaĝa kruelo.
 Inter popoloj teraj ĝi signas veran avanon,
 montrante la direkton de la irvojo futura.
 Preter komencaj fuŝoj, la surplaneda homaro
 500 alprenos ĝustan vojon al packonkordo kaj alta
 scienca evoluo, ĝis ili povos atingi
 gradon de civilizo je nia sama nivelo.

Aŭdinte l'argumentojn de l'interveno de Emme,
 sian femuron batis Roa kaj jene replikis:
 - Kiel kuraĝas vi, ho Emme, kompari la Goban
 superan civilizon kun tiu de la teranoj,
 ties stadion nunan kun nia praevoluo?
 Homoj el Goba, ili certe radike malsamas.
 En nia kazo temis pri demenculoj izolaj

510 sen elektita celo: en ili penso rezona
ne intervenis. Male, ĉe la Bluanoj aperte
temas pri ĝenerala kaj plenkonscia murdemo.
Krome, se iu escepto raras, pri kio mi dubas,
ĝi ŝajnas sen futuro ĉar ĝuste alidirektas
al konsekvenca vojo de perfektigo pograda:
de ecoj en aliajn ili transiras abrupte.
Mi mem kapablas pruvi, ke fundamente kruelas
tiuj tribanoj strangaj, pri kiu Emme raportis,
ke ili enmiksigis aŭ enmiksigos en murdojn,
520 kverelojn kaj militojn, se nur sufiĉe da tempo
oni disponus, ĉar ni ilin ekkonis unue
antaŭ nur kelkaj jaroj. Krome, logikas aserti,
ke l'endokrinaj trajtoj nepre influas egale
ĉiujn loĝantojn terajn. Temas pri ege minaca
kaj eksterminda raso: sendube ili posedas
inteligenton, tamen sen ajna bremsio ĝin uzas
por multobligi daŭre kaj por rafini la ilojn
de detruado frata. La alianco maligna
de penso kaj murdemo fariĝas pleje detrua,
530 ĉar se ĉe violento mankas elstara racio,
kiel ĉe rabobestoj en ĉiu mondo konata,
ĝi ne transiras ekster sia kondiĉo natura,
ne iĝas katastrofa. Sed ĉe kunesto de ambaŭ,
se racieca penso ne superregas efike
l'instinktojn brutajn, kiel laŭ pruvoj okazas
en la Bluanoj, tiam ĝi iĝas kosma danĝero.
Tiajn estulojn oni devas pritaksi eraro
de l'naturu. Se ili, iam, malkovrus, evente
l'atoman energion, antaŭvideble ĝin uzus
540 por detruado propra. Kaj se hazarde ne kaŭzus
diskrevon de l'planedo, ili finfine deturnus
siajn terurajn povojn kontraŭ planedoj aliaj
aŭ kontraŭ sunsistemoj. Tial tutkosma minaco
ni devas ilin juĝi kaj ne danĝero por ili
nursole. En rezulto, ilia raso fariĝas
eliminenda. Tion mem la naturo projektas.
Niaj leĝoj devigas helpi, ĉe tiaj okazoj,
estaĵojn intelektajn, se ili estas emioj,
sed ja ne subrasanojn: pro tio indas atendi
550 ties pereon, por la bono de raso supera.
Kaj, post la kataklismo, ekkolonii ni rajtos,
senbare, la planedon por renaskiĝo de Goba.

Li diris. Baldaŭ Emme en l'assembleo respondis:
- Numu, vi jam delonge celas ekstermon amasan
de la Bluanoj, eĉ de antaŭ esploro profunda
pri ties civilizo. Vi mem forgesi ne povas
la morton de Loedu, ekde la paŝoj unuaj,
dum li esploris Edden. Sed kial kulpi teranojn
pri nura akcidento, kiu povintus okazi
same en Goba?

560

Tiam Numu replikis amare:
- Ho Emme, ĉiuj scias, ke mian filon unikan
mortigis indiĝenoj, kiam li venis al ili
ambasadori pace. Ĉu estas ia hazardo,
ke lanco lin traboris kaj eblis fari nenion
kurace? Tamen, kial vi tiom arde defendas
subraciulojn, kontraŭ la elsaviĝo decida
de nia civilizo kaj de popolo ĉiela?
Ĉu do ne veras, ke vi iniciatis en kaŝo
eksperimenton genan, ĉar ĉiam rekte riproĉis,
570 ke nia civilizo estas danĝere tro multe
intelekta kaj planas kreon de raso radike
nova per la kruciĝo inter estuloj el ambaŭ
specioj, inter *gobdoj* kaj aŭtoktonoj *agaaj*?
Juĝontoj, se pruvite, ĝi estus kroma motivo
por ne eviti sed, male, por akceli volonte
l'estingon de la tera gento: ĉar nepre logika
sekvo ja estus iu raso simile detrua
sed pli inteligenta, kio kunportus apenaŭ
antaŭvideblajn misojn por la planedo terana
580 kaj por la tuta kosmo. Nepras ĝin zorge preventi.

580

Tiam ekstaris Emme kaj jenavorte rebatis:
- Reprezentantoj Gobaj: Numu eldiris akuzojn
senpruvajn. Kiel bapti eksperimento genera
nuran rilaton aman kun Bluanino? Ĝi eblas
tute privata faro, kiu ne statas iele
malpermesita de ia interstela regulo,
se post analizado montriĝis taŭge similaj
la organismoj. Kiu risko el ama rilato
plene konsenta venas, el amo inter emioj
de malproksimaj astroj, se nur riĉiĝo, progreso?

590

Vigle ekstaris Roa kaj respondante replikis:
- Juĝontoj kaj Gobanoj, Emme denove supozas,

ke l'teraborigenoj estas entute raciaj.
Sed jen la diskutpunkto centra: se ili pruvite
estus emioj, tiam interrilitoj amoraj
laŭnorme akcepteblus. Sed ili certe ne estas;
tial nek amrilatoj nek la defendo de fuŝaj
estuloj subhomecaj, kontraŭ saviĝo de gobdoj,
pravas aŭ konsilindas. Jen miaj finaj asertoj.
600 La decidontoj juĝu pri la konforma realo.

Tiam parolis Emme kaj por konkludo li diris:
- Mi plu defendas firme la emiecan esencon
de l'tera loĝantaro. Se inter ili troveblas
sovaĝo kaj militoj, ĉi tio signas etapon
transiran en ilia evoluado miljara,
kiel ni mem travivis similaspecan unue.
Ili estas samrasaj al ni kaj al la ceteraj
raciaj homoj universe: pro tio ni devas
defendi la Bluanojn el katastrofa ruino,
610 eĉ kontraŭ la danĝero de nia propra detruo.

Post kiam l'oponantoj finis alporti la pruvojn
kaj argumentojn taŭgajn, la Tribunalo Supera
kunvenis konsiliĝe en najbardoma salono,
revidis la informojn, nove kontrolis atestojn
dum helpe prikonsultis la komputilon Ajuban.
Post horo bluis flago super vitreca kupolo.
Kiu ekster iris inter arbaroj *obuaj*
ensaloniĝis baldaŭ por ekaŭskulti la finan
juĝon de l'Najkortumo. La halo bunte briladis
per surmanikaj strioj de l'respektivaj okupoj.
620 Murmuroj kaj babiloj en la ĉambrego silentis.
Oes ekstaris sur alta prezidenta tribuno
kaj la verdiktan akton solenavoĉe li legis:
- Gobaj reprezentantoj kaj ĉielana civito,
aŭskultu la verdikton, la determinon elaŭdu:
la Naja Tribunalo juĝis, ke Emme Soraa
rajtos per funda hipnotizo averti nur unu
homon el tiu gento de la insulo de Dilmun,
kaj se sukcesos eĉ se nur familio saviĝi,
630 per propraj vojrimedoj, el tiu sama popolo,
tiam ni fine lasos senkolonie la teron,
aliacele daŭros nia vojaĝo trakosma.
Sed se neniuj paro el la popolo dirita

sukcesos supervivi post la venonta detruo,
ni rajtos kolonii la teran astron inundan.
Dume, neniuj gobdoj interferadu iele
ĉe l'kurso de l'minaca astro aŭ helpe favoru
la surplanedan tribon, ekster l'averto de Emme.

640 Mirante, stacianoj la juĝproklamon aŭskultis,
sed ili prikonsentis kaj tuj ekstaris aprobe.

Finigis l'Asembleo Naja kaj ĉiu revenis
ŝabien. Ankaŭ Emme, kun svarmaj pensoj anime,
veturis siahejmen, al valdekklivo Noguel,
en arbareto Dujun, kaj en la ĉambro medita
sian edzinon trovis. La ejon milde pribanis
smeralde glaŭkaj tonoj kaj ŝvebis ondo parfuma.
Post kunsaluto, Emme el sub la planko venigis
anatomian seĝon, per siblo transmisianta
l'ordonojn ultrasone, kaj al l'edzino komentis
650 decidojn de l'Kortumo dum l'Asembleo pasinta
kaj pri la rajto lia averti nur unu homon.
Dunna demandis jene al sia edzo brovsulka:
- Kiel homido povos sin savi proprarimede?
Laŭ astronomoj, la tutan teron kovros inundoj
teruraj.

Emme diris al la edzino bedaŭra:
- Ho Dunna, post kunveno, mi jam konsultis Uduen,
stabeŝtran fizikiston, kaj li pretigis, akorde,
kalkulojn ĉi-rilatajn: nepros konstruo de ŝipo
kun tiaj proporcioj, ke ĝi eltenu rulondojn
660 kaj staru ĝustaloke, apud vastflua rivero,
kiam kaskados maroj pro l'kataklisma returno.
Aliaj eblaj solvoj, kiel rifuĝo kaverne
kun la necesaj nutroj por longedaŭra bivako,
aŭ sur altpinta monto, post esplorado montriĝis
malpli konformaj, aŭ ne realigeblaj efike
en nuna tempo, kun minimuma ŝanco probabla.

Dunna lamentis: - Certe, estus pli multe sekure
kaj sendanĝere, se ni kunprenus grupon elektan
da aŭtoktonoj en nian kolonion, antaŭe
670 endormiginte ilin, kaj post la faro reportus
planeden, ke unika raso ne tute pereu!

Emme respondis jene al la edzino pledanta:
- Ne eblas ja, ho Dunna, ĉar la Kortumo Supera decidis neŭtralece plifavorante neniun parton. Tial, la ŝancoj de supervivo de homoj ne estas certigitaj. Kvankam fortune sukcesus postresti kelkaj grupoj tra l'tuta tera surfaco, tamen, kondiĉo estas, ke inter ili troviĝu pluraj de l'Kena tribo. Kaj aliflanke ne eblas
680 ilin sisteme helpi per avantaĝa tekniko aŭ iel influadi en la tergloba kulturo.

- Kaj kiun Dilmunidon vi, do, intencas averti? - Nun pridemandis Dunna.

Respondis jene Sora:

- Mi pensis pri Utnoa, ĉar homo tute fidinda, nobla, sincera, kiu kredas je pia veturo al la insulo praa, post ekziliĝo dolora, kaj kun aliaj celas hejmen vojaĝi tramare. Li rangas alta ĉefo en la tribaro de Dilmun kaj povus entrepreni kun sukcesblo ĉi taskon.
690 Mi rekte lin ekkonis kaj alrilatis amike, dum mia esplorado sur Ŝinarlando, nomade vestita en kostumo de la popolo de Henoh.

Tagfine la geedzoj, post *juvo*-trinko komuna, fajfis ultrafrekvencajn sonojn, kaŝonte la seĝojn kaj ekfunkciigonte la mekanismon eligan de l'du ŝaŭmlitoj: el planko du sferdiskoj emergis kaj ŝvebis super ĝi per magnetoforta levito. Ĉirkaŭe kreske fluis ŝaŭmo organokemia, grizeca, kiu iĝis sekve komplete solida
700 kaj ĝi akiris formon de spongotruea divano. Ambaŭ nudiĝis, ĵetis al dissolvujo la vestojn, la litojn kuntuŝigis kaj post plezuroj amoraj, liveris sin al dormo, ripozigonte la lacojn.

Je la mateno sekva, per sia ŝipo li flugis al tero kaj rimarkis Uttun sur pinto de monto, irintan el tendaro, apud rivero Purattu. Li tuj alproksimiĝis kaj subenŝvebis apike. Lia flugdisko, kiu gobe nomiĝis *oavo*, aspektis lentoforma kaj arĝentece briladis.

710 Ĝi povis flugi ajndirekte, ĉu orte, zigzage, returne, spiralforme, sen iaspeca damaĝo por ties kosmonaŭtoj, ĉar la kajutoj internaj estis ĉirkaŭvolvitaj de altfrekvenca kamero magnete energia, kiu kompensis abrupcon de l'dinamikaj fortoj kvazaŭ plej mola matraco. Li nun radiis dense kvietigantan efluvon, ĉar Noa ne kontemplis iam similan aperon, tial, ke li ne timu kaj nepre lin ne rekonu, laŭ ĵusaj instrukcioj de l'Tribunalo de Goba.

720 Post kiam Emme elŝipiĝis renkonte al Uttu, ĉi tiu terenfalas pro l'trankviligaj elanoj. Sora, liaflanke, per jena diro komencis:
- Ekstaru, ho Utnoa, ĉar mi parolos anonce.

Post kelksekunda kuŝo en senkonscio profunda, pupilojn li malfermis kaj kun surprizo rigardis. Kiel pegido gvas el la breĉita trunesto, kiun, ĉarpentis zorge gepatroj antaŭ ovumo kaj frapis aperturon nur laŭ mezuro por ovo kaj por enmeto ĝusta de l'longa beko nutronta;
730 la ido restis ĉiam en sia ombra kavaĵo sur altimpona trunko, ĉe ĝia supro protekta, vidante nur rondeton de l'firmamento senlima kaj nun unuafoje antaŭ ekflugo libera esploras arbardensojn per ĉirkaŭgapaj okuloj, tiel Utnoa spertis antaŭ surpriza ĉeesto de nekonata bildo, al ĉielano simila, kaj li kun nekredemo pri la veninto miradis: jen staras homfiguro en vesto geme safira, strikte algluiĝanta, ĉar ĝi konture teniĝas
740 al torso, brakoj, kruoj, kun zono ore brilanta. Ĝi ŝajnas stranga fiŝo kiu ĵus venus el ondoj. Sed li ne timis iel, pro la radiaj efluoj, kaj povis lin kompreni.

Pludiris Emme Sora:

- Ho Uttu, vojmigranto el la popolo de Dilmun! Mi devas vin averti pri kataklismo venonta, kiu decidus ŝanĝon por via vivo nomada en Ŝinar: post du jaroj, dum la monato de Kisleŭ, je la dek-sepa tago de la sezono de pluvoj, ĉiuj malsekaj teroj suferos vastan inundon.

750 Certe, nenio jam fareblas deturni la ŝancon,
sed estis elektita via popolo saviĝi,
ĉar vi ne planas morton nek ĵuras venĝon embuskan:
tial vi rajtas supervivi kaj mastri la teron.
Konstruu al vi ŝipon el nigra ligno gofera
laŭ jenaj dimensioj: de fin' al fino ĝi longu
naŭdek ulnojn kaj laŭ la larĝo la ŝipo mezuru
dekdu ulnojn kaj laŭ la alto ĝi havu sep ulnojn.
Ekstere kaj interne la ŝipon ŝmire vi gudru.
Zorgu, ke ĉiuj traboj firme, kompakte gluiĝu
760 kaj ene disponigu unu superan etaĝon.
Ĝin levu sur la bordo de larĝeflua rivero.
Viajn posedojn ŝarĝu kaj distribuu ĉeŝipen
hejmbestojn akompanajn. Krome enmetu la manĝojn
necesaĵn por elteni dum la monatoj inundaj
ĝis resekiĝos grundoj. Kaj viajn familianojn
invitu kunvojaĝi. Je la aŭroro fatala
ene atendu, ĉar nuboj kolektiĝos arope
sur okcidentaj montoj kaj ŝtorma vento vekigos
de tie. Jen la signo, ke la inundoj apudas.

770 Baldaŭ revenis Emme al sia disko platena
kun kora disŝiriĝo, ĉar li ne povis al Uttu
deklari l'identecon kaj adiaŭi l'amikon.
La ŝipo blanke flagris kaj fulme svenis eteren.

Utnoan tuj ekkaptis dormemo peze profunda
kaj li sub densa ombro, terebintarbe kuŝiĝis.

780 Kiam la suno rondis meze de l'volbo ĉiela,
Laŝmu, adopta frato kaj kamarado de Uttu,
rimarkis la foreston longan kaj serĉe foriris
senvorte. Li renkontis lin sur montpinto Bezera,
kontraŭ terebintarbo kuŝantan dorme sub ombro.
Laŝmu tuŝvekis Uttun, kiu malfermis okulojn
kaj dense lin rigardis kvazaŭ el fora vojaĝo
li ĵus revenus. Tiam Uttu paroli komencis:
- Ho Laŝmu, mia frato, beninda ido de Beŝet.
Jen mi vekigis ĵus el stranga, mistera vizio.
Dum mi promenis tie, inter arbedoj akantaj,
jen venis al mi homo, kiu mirinde similis

790

al Henoh la blankbarba, nia popola praulo,
kaj li parolis al mi, per jena vorto li diris:
"- Konstruu al vi ŝipon el nigra ligno gofera,
ĉar baldaŭ trafos landon neelteneblaj inundoj
je la monato Kisleŭ. Parencoj, familianoj
suriru, kaj enmetu havaĵojn nepre bezonajn
kaj brutojn rondegufajn, kiuj per herbo nutriĝas.
Interne kaj ekstere la ŝipon ŝmire vi gudru
kaj tiun vi ĉarpentu apud fluakvo rivera.
Jen blovos ŝtorma vento sunsubireje de Ŝinar
por avertilo, kiu signos la tagon inundan.
Tiam engrimpu ŝipen, klapfermu zorge tabulojn
800 kaj goferaĵo glitos sur larĝa fluo de l'ondoj,
ĝis ili vin kondukos al la marbordo feliĉa."
Sekve li ankaŭ precizigis al mi la mezurojn
de l'ŝipo konstruota por la saviĝo komuna.
Kion laŭ vi, ho Laŝmu, ĉi tiu sonĝo deklaras?
Ĉu tio estas vere averto de la pradioj,
ke ni revenu fine al la insulo de Dilmun?

800


810

Tiam respondis Laŝmu, post konsidera pripenso,
antaŭ mirigaj novoj de lia frato, ĉi-vorte:
- Ho Uttu, ĉiu homo en la tendaro memoras,
ke la generacio nuna la sepa jam estas
nombre post la forlaso de la insulo miela
kaj ni rivelon dian de antaŭ jaroj atendis
por firme decidiĝi al patrolando veturi.
Multaj konsentis celi al la marbordo de Ŝinar
ĝuste pro tiu diro kaj profetaĵo popola.
Sed antaŭ ol paroli al la tribaro necesas
certiĝi kaj por tio nepras konsulti la pastrojn.
Morgaŭ ni planas iri al la foiro Babela.
Do, ni konsultu urbe Luhebun, tiun maljunan
820 kaj sanktan pastron el Urida popolo nomada,
forvojaĝintan june al la Puratta ĉefurbo
por gvate priesplori la firmamenton eternan
kaj interpreti signojn de la diaĵoj en alto.

820

Tiel parolis Laŝmu kaj li persvadis Utnoan.
Poste revenis ambaŭ al la tendaro de Henoh.
Kiam la suno sinkis trans horizonto purpura
kaj steloj scintiladis ĉirkaŭ la kurba lunvelo,
Uttu kuŝiĝis dormi sur lana bunta tapiŝo,

830 multbilde prezentanta la prainsulon agrablan,
kiun elteksis Sara dum longaj noktoj ameme.
Ankaŭ ekkusis Laŝmu en nigra tendo ripoze.



Dua kanto

Kiam per rozaj fingroj aŭroro sunon anoncis
kaj brilis jam la ondoj de la Puratta rivero,
susuraj melodioj homojn el dormo vekantaj,
en la popolo migra Uttu kaj Laŝmu leviĝis
kaj venis el la tendoj por trakolekti la brutojn.
Ili grupiĝis ronde kun la tendanoj irontaj
por distribui taskojn laŭ la farenda laboro
kaj tuj elektis bovojn, ŝafojn kaj same l'azenojn
portontajn marĉandaĵojn al la Ŝinara ĉefurbo.

10 Dume en la ĉielo, Roa Numuo meditis
pri la aferoj ĵusaj en sia ŝipo kupola
kaj en la centra ĉambro de la oavo promenis.
Lin ĉirkaŭringis mapaj bildoj sur lumaj ekranoj,
el la najbaraj steloj, el la planedo lazura.
Nun li sidiĝis meze de la kajuto rigardi
tra prisma lensotablo super la lando Rivera.
Vidis orbitajn tendojn apud Purattu situajn
kaj formiksvarman grupon al bazarurbo migrantan.